La entrepreno ABC Enciklopedioj S.L. kaj la Universitata Instituto pri Aplikita Lingvistiko, ligita al la Universitato Pompeu Fabra, en Barcelono, komencis prilabori aŭtomatan tradukilon de la kataluna kaj de la hispana al Esperanto. Sub la kunordigo de profesorino *Núria Bel* kaj kun la helpo de Kataluna Esperanto-Asocio kaj Prompsit, entrepreno de la esplorgupo Transducens de la Universitato de Alakanto, skipo de lingvistoj ellaboros dum dek monatoj programaron per malferma kodo por aŭtomate traduki esperanten el tiuj du lingvoj oficialaj en Katalunio, kune kun la okcitana. La ellaborado baziĝos sur la malfermkodaj programoj kreitaj de Transducens, en kunlaboro kun aliaj universitataj laborgrupoj el Iberio, kaj, pli konkrete, ĝi ekos el la aŭtomata traduk-sistemo per parta sintaksa transfero por parencaj lingvoj nomita Apertium. La projekto estas daŭrigo de la antaŭaj laboraĵoj pri aŭtomata tradukado kun malferma kodo por la paroj kataluna-okcitana, kataluna-franca kaj kataluna-angla, faritaj de la Universitata Instituto pri Aplikita Lingvistiko kaj Transducens, kiuj komenciĝis la pasintan majon kun la financa subteno de la kataluna registaro. La elekto de tiu ĉi programaro el inter la disponeblaj ŝuldiĝas al du gravaj kialoj: la alirebleco de la programoj, ĉar ili estas la solaj pri aŭtomata tradukado kun malferma kodo, kaj la facila program-ebleco. Ĉi tiu faktoro, kvankam ĝi endanĝerigas la kvaliton de la rezultoj, se oni ĝin aplikas al strukture malproksimaj lingvoparoj, garantias rezulton, kiun, siavice, povos plibonigi la uzantoj. Tiel do, oni deziras aparte atenti pri la dokumentado de la metodaro necesa, por ke aliaj laborgrupoj aldonu novajn lingvojn al la sistemo, ĉefe lingvojn malpli uzatajn. Esperanto jam estis uzita en aliaj projektoj pri aŭtomata tradukado, inter kiuj la plej gravan kreis la nederlanda entrepreno BSO (nun Atos Origin) dum la periodo 1982-1992 kun entute 50 jar-homoj da laborinvesto. En tiu okazo Esperanton oni uzis kiel pontolingvon por traduki inter diversaj oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio. La uzo de punta lingvo (aŭ "pivota" laŭ la ĵargono uzata en la aŭtomat-traduka medio) draste malpliigas la nombron de tradukparoj necesaj por plenumi ĉiujn eblajn tradukojn, tiel ke, inter la nuntempaj 21 oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio, la uzo de pontolingvo rezultigas 42 necesajn direktojn, dum sen ĝi oni bezonus 420. Tiu ŝparo tamen havas sian malavantaĝan flankon, nome la duoblan tradukadon, kio signifas malpliigon de la kvalito de la rezulta teksto. BSO vetis je la uzo de planlingvo kiel Esperanto, kiu per sia reguleco principe simpligas la tradukprocezon kaj provizas pli altan fidindecon. Tamen tiu projekto finfine ne prosperis, same kiel ĉiuj aliaj tiutempaj konkurantoj, pro la nepreteco de la

teknologio. La uzado de Esperanto en novaj projektoj kiel tiu ĉi povus klarigi, ĉu la veto de la nederlanda entrepreno estis trafa, kvankam tro frua. Aliflanke, Katalunio akumulis en la lasta jardeko multajn sciojn pri aŭtomata tradukado. Pluraj ĵurnaloj inkluzive de la plej legata havas siajn ĉiutagajn eldonojn en la kataluna kaj la hispana lingvoj danke al aŭtomataj tradukoj (nepre kontrolataj de reviziantoj). Pinte de tiuj fakaj scioj pri aŭtomata tradukado situas la Universitato de Alakanto, en Valencilando, dum la Universitato Pompeu Fabra, la laste kreita publika universitato en Katalunio, per sia Universitata Instituto pri Aplikita Lingvistiko, elstaras de kelkaj jaroj per siaj esploroj pri komputa lingvistiko.

(Informis: Kataluna Esperanto-Asocio www.Esperanto.cat)

5 La latina lingvo hodiaŭ

Věra Barandovská-Frank

La Latina, iama internacia lingvo, estas daŭre aktive uzata kaj flegata. Oni povas konvinkiĝi pri tio precipe en interreto. <http://www.latinitatis.com/> estas bona adreso por konatiĝi kun kelkaj dekoj da organizaĵoj, nomataj „circuli“, „sodalitates“, „societates“, eĉ „academiae“ kiuj aktive rete latinumas, organizas latinajn kunvenojn, lernejojn, feriojn, festivalojn kaj ludojn. Bedaŭrinde, preskaŭ ĉiuj tiaj aranĝoj okazas dum nuraj du monatoj julio kaj aŭgusto, ĉar ili direktiĝas precipe al studentoj kaj instruistoj, kiuj tiam havas feriojn. Multaj tiaj organizaĵoj estas membroj de „Societas Circulorum Latinorum“ kaj prezentiĝas sub <http://www.latinitatis.com/vita/circuli.htm> ,

Jen alfabeto listo:

[Circulus Latinus Barcinonensis](#), [Cena Latina Berkeleiensis](#), [Circulus Latinus Bogotensis](#), [Circulus Latinus Bonaerensis](#), [Circulus Latinus Bononiensis](#), [Circulus Latinus Brüllensis](#), [Circulus Latinus Buffaloensis](#), [Circulus Latinus Caesaraugustanus](#), [Circulus Latinus Canariensis \(Las Palmas\)](#), [Circulus Latinus Catinensis](#), [Circulus Latinus Gaditanus](#), [Circulus Latinus Gerundensis](#), [Circulus Societatis Latinae Lexintoniensis \(in Kentukia\)](#), [Circulus Latinus Londiniensis](#) , [Circulus Latinus Lutetiensis](#), [Circulus Latinus Matritensis](#), [Circulus Latinus Panormitanus](#), [Circulus Latinus Perpinianensis](#), [Circulus Latinus Portualacrensis](#), [Circulus Latinus Pragenus](#), [Circulus Latinus Romanus](#), [Conventiculum Latinum Safrense](#), [Circulus Latinus Seattlensis \(Boreoccidentales\)](#), [Circulus Latinus Vallisoletanus](#), [Circulus Latinus Varsoviensis](#), [Circulus Latinus Verinensis](#), [Circulus Latinus Xerensis](#), [Circulus Latinus Zagabiensis](#).

La plej prestiĝa internacia organizaĵo de aktivaj latinistoj estas [ALF \(Academia Latinitati Fovendae\)](#) <http://academialatina.org/index.htm>. Ĝi fondiĝis en 1968 ĉe „Istituto di Studi Romani“ en Romo kaj havas kvindek da membroj, kiuj rajtas esti nur universitataj profesoroj pri la Latina kaj bonmeritaj latinistoj. Momente prezidas ĝin germano *Nicolaus Sallmann*. La unua (fonda) kongreso okazis 1966 en Romo, sekvis Bukaresto (Rumanio)1970, La Valleta (Malto) 1973, Dakar (Senegalio)1977, Trier (Germanio) 1981, Dunhelm (Britio) 1985, Erfurt/Berlin (1989), Antwerpen/Leuven (Belgio) 1993, Jyväskylä (Finnio) 1997, Madrido (Hispanio) 2002, Alganicia/Amposta (Hispanio) 2006.

La proksima kongreso estos en 2009 en Regensburg, Germanio. Kongresojn, kie oni kompreneble parolas nur latine, vizitadas ĉ. tri centoj da latinistoj el la tuta mondo (jes, eĉ el Afriko kaj Azio), por aŭskulti prelegojn de famuloj pri kongresa temo kaj por pridiskuti en sekcioj similajn aŭ ĝeneralajn temojn, precipe pri disvastigo de la viva Latina.

Tre aktiva estas “Accademia Vivarium Novum“ en Montella (Italio), <http://www.vivariumnovum.it/>.

Ĝi ofertas studadon de la latina kunlabore kun multaj eŭropaj universitatoj (staĝoj kaj interŝanĝoj de studentoj), eldonas lernmaterialojn kaj organizas simpoziojn. La plej granda ĉijara latinisma evento estis kongreso en Napoli fine de julio, kiun krome kunorganizis loka filozofia instituto kaj fondaĵo „Mnemosyne“. En la ĉefa programo prelegis la famuloj de ALF, sed krome ĉeestis multaj novaj kaj junaj latinistoj.

Vox Latina (<http://www.voxlatina.uni-saarland.de/>) estas latina grupo en la universitato de Saarbrücken, eldonanta samnoman revuon. Sur la retpaĝo oni povas ankaŭ klicki al voĉlegataj novaĵoj kaj aktualaĵoj. Krome, Vox Latina organizas ĉiujare du feriajn seminariojn, unu tradicie (ekde 1973) en bela naturo por promeni en montaro, en Morschach (Svislando), en kies proksimeco krome troviĝas grandegaj novkonstruitaj termoj laŭ romia maniero.

La dua seminario ĉiam okazas ie, kie oni povas mediti kaj filozofumi, ĉijare ĝi estis en abatejo Madresous en Belgio.

Venontjare oni kunvenos en Morschach 20.7.-26.7. 2008 , la dua seminario estos en „Robert Schuman Haus“ en Trier 3.8.-9.8.2008.

Abatejo de Frigolet en suda Francio ankaŭ jam dum multaj jaroj dum la lasta julia semajno estas rezervita al latina feriumado kun iom da okcitana odoro (antaŭe kunorganizis ĝin „Schola Bellanda“ el Nizza kaj oni povis lerni tie ankaŭ la okcitanan).

<http://www.klassphil.uni-muenchen.de/~stroh/sodalitas.html> estas paĝo de „Latinaj ludoj“, tradiciva organizaĵo el Munkeno, specialiĝinta jam pli ol dudek jarojn pri latinaj festivaloj de poezio, muziko, teatro, sed organizanta ankaŭ kursojn kaj renkontiĝojn.

Ankaŭ LUPA (latinitatis Vivae Provehendae Associatio, <http://pagina.de/lvpa/>), kiu fondiĝis antaŭ dudek jaroj en iama romia kolonio Xanten, estas hodiaŭ internacia organizaĵo kun ĉ. 200 membroj, kiu ĉiujare organizas plurajn seminariojn por gejunuloj pri literaturaj kaj historiaj temoj kaj kunlabore kun diversaj universitatoj (Prago, Vieno, Krakovo k.a.) somerajn simpoziojn, kie krom prelegoj de bonaj latinistoj funkcias konversaciaj, kantaj, teatraj kaj turismaj grupoj. En 2007 okazis la simpozio en Krakovo.

<http://users.skynet.be/Melissalatina/> estas hejmpaĝo de brusela organizaĵo, kiu krom eldonado de revuo „Melissa“ („Abelo“) ĉiujare organizas somerajn seminariojn, kie oni multe konversacias kaj ekskursas en Belgio (foje en Bruselo mem, ĉijare en Saint Flour).

Paĝo <http://www.latin.org/> apartenas al SALVI (Septentrionale Americanum Latinitatis Vivae Institutum - North American Institute for Living Latin Studies) en Kalifornio, kiu publikigas latinajn lernmaterialojn, kunlaboras kun diversaj universitatoj kaj ofertas ĉiujare (ankaŭ en aŭgusto 2007) „Rusticatio Californiana“, feriumadon kun „kompleta mergiĝo“ en latina lingvo.

Por komencantoj servas simila aranĝo en Virginio (Rusticatio Virginiana). Ĉijare okazis krome seminarioj en virginia Villa Claymont kaj en San Francisco. Similajn kunvenojn (Conventiculum Lexintoniense) faras ĉiujare Terentius Turnberg en Kentucky. Li krome eldonas retan ĵurnalon „Retiarius“ (<http://www.uky.edu/AS/Classics/retiarius/>).

http://www.wenval.cc/boreoccidentales/boreo_latin/vitacirculilatini.asp estas adreso de usonaj latinistaj kluboj en Seattle, Bellingam, Wenatchee kaj Washington. Ili okazigas kursojn kaj

seminariojn ĉiam inter oktobro kaj majo, kaj krome diversajn feriumadojn (sportan, turisman, kamparan ktp.), dum kiuj oni kompreneble ankaŭ konversacias latine.

Jam la 19-an fojon okazis ĉi-somere „Septimanae Latinae Europae“, (<http://www.maierphil.de/SeptLat/>), ĉe Limburg, kie oni lernas latine paroli kaj romie kuiri. Krom preparado de diversaj frandaĵoj oni ankaŭ ekskursas, teatrumas kaj koncertas. Ŝatata lernmaterialo estas la libro „Piper Salve“.

Latina societo en Cádiz (<http://gades.latinitatis.com/>) aktivas ne nur per universitataj kaj feriaj kursoj, sed ankaŭ per moderna muziko – sur ĝia paĝo oni trovas aliron al radiostacio „Punto Radio“, anoncon pri KD „Liberatio“ de la rokgrupo „Krypteria“ kaj intervjuon kun kantistino Sylvia Bolívar.

Se vi volas lerni kaj konversacii latine en la reto, aliĝu al Schola Latina Universalis (http://avitus.alcuinus.net/schola_latina/), kie vi ankaŭ trovos „aron da latinparolantoj“ (Grex Latine Loquentium) por kuna babilado. Tion ofertas ankaŭ „Locutorium Panormitanum“ (<http://www.cirlapa.org/locutorium.htm>), societo „Rostra Nova“ (<http://www.bingo-ev.de/~rw937/rostra/>) kaj la babilejo de Finna Radio (<http://chat.yle.fi/ylerradio1/latini/index.php>).

Simile, <http://www.linguaeterna.com/> enkondukas la paĝon de latinistoj el Novgorod (Rusio) kun konversacia kurso kaj vortaroj latina-rusa kaj rusa-latina kaj kun babilejo .

Mallongaj filmoj en la latina troviĝas sub <http://www.cirlapa.org/audiovisifica.htm>. La filmon „Gladiator“ en latina traduko oni trovas sub www.krescendo.com/gladiatorlatin/index.html, latinlingva versio de „Mastro de l' ringoj“ estas en <http://www.geocities.com/dominusanulorum/> .

„Forum Latinum“, ĵurnalo kun novaĵoj el la tuta mondo estas en <http://ephemeris.alcuinus.net/>. Ekzistas eĉ speciala ĵurnalo pri vetero, „Meteorologia Romana“ sub <http://latin.wunderground.com/global/stations/16239.html>.

Latinlingvajn radioelsendojn flegas jam dum multaj jaroj Finna Radio (<http://www.yleradio1.fi/nuntii/>), kiu eldonas ilin ankaŭ libroforme, kaj nove Radio Bremen (<http://www.radiobremen.de/nachrichten/latein/>).

Parolante pri latinaj aktivaĵoj oni nepre devas mencii ankaŭ „Schola Nova“ en Belgio, (<http://www.scholanova.be/>), kiu estas unika lernejo (privata) kun latina instrulingvo, fondita 1995 kaj ofertanta kompletan bazprogramon laŭ belgaj leĝoj (matematiko, fiziko, kemio, biologio, geografio, historio, arto, lingvoj – krom la latina -, greka, hebrea, nederlanda kaj angla.) Ĉiuj ĝiaj studfinintoj sukcesis akiri ŝtatan diplomon kaj ekstudi sur superaj lernejoj.

(La retaj adresoj estas de 2007-10-11)

6 UN-Dokumento pri plurlingvismo: 2008 – Internacia Jaro de Lingvoj

Antaŭrimarko:

La sekvan dokumenton mi iam ricevis, sed bedaŭrinde ne plu trovis la fonton. Mi ankaŭ ne konas la tradukinton de la dokumento el la angla al Esperanto. Mi ne certas pri laŭnormeco aŭ ĝenerala uzateco de la landnomoj. Evidente videblas prefero por la sufikso –ujo.

Cetere temas pri netaĵo.

En la reto ekzistas la angla teksto de la sama rezolucio kun la kodo A/61/L.56 – 16. May 2007 (http://www.franceonu.org/article.php?id_article=1467 Juĝante laŭ la dato ĝi verŝajne estas la definitiva versio.

Malgraŭ ĉiuj necertaĵoj kaj tute kontraŭ miaj kutimoj mi tamen publikigas la provizoran tekston, ĉar ĝi stimulu pensi, kiel agadi en la esperantista medio en 2008, lige al la *Jaro de la Lingvoj*. (La red.)

Unuiĝintaj Nacioj A/61/L.56

De la Ĝenerala Asembleo

**Distribuo ekde 9.majo 2007
(Originalo en la angla)**

Sesdek-unua sesio.Tagordero 114 ,Plurlingvismo

(Akceptis la malnetan rezolucion:

Afganujo, Albanujo, Andoro, Argentino, Armenujo, Aŭstrujo, Bangladeŝo, Belarusujo, Belgujo, Benino, Bolivio, Bocvano, Bulgarujo, Burkino, Burundo, Kameruno, Kanado, Kabo Verda, Centrafrika Respubliko, Ĉado, Ĉinujo, Komoro, Kongo (Brazavilo), Kostariko, Ebura Bordo, Kroatujo, Kipro, Ĉeĥa Respubliko, Demokratia Respubliko Kongo, Ĝibuto, Dominika Respubliko, Egiptujo, Salvadoro, Francujo, Gabono, Gambio, Kartvelujo, Germanujo Grekujo, Gvatemalo, Gvineo, Hajtio, Honduro, Hungarujo, Irlando, Israelo, Kazakujo, Kirgizujo, Latvujo, Libano, Libio, Lihtenŝtejno, Litovujo, Luksemburgo, Madagaskaro, Malio, Maŭritanio, Maŭricio, Meksiko, Moldavo, Monako, Maroko, Mozambiko, Niĝerlando, Niĝerio, Omano, Palao, Panamo, Paragvajo, Portugalujo, Kataro, Rumanujo, Rusia Federacio, Sanmarino, Saŭtomeo kaj Prinsipo, Senegalo, Sejŝelo, Slovakujo, Slovenujo, Somalujo, Sudafriko, Hispanio, Sudano, Svislando, Taĝikio, Makedonio, Togolando, Tunizio, Turkmenio, Ukrainio, Tanzanio, Vjetnamujo kaj Jemeno.)

La Ĝenerala Asembleo,

Agnoskante, ke la Unuiĝintaj Nacioj subtenas plurlingvismon kiel rimedon por akceli, proteki kaj konservi tutmonde diversecon de lingvoj kaj kulturoj,

Cetere agnoskante, ke vera plurlingvismo akcelas unuecon en diverseco kaj internacian interkompreniĝon, kaj *agnoskante* la gravecon de la kapablo komuniki kun la popoloj de la mondo pere de ilia propra lingvo, ankaŭ per manieroj alireblaj de homoj kun malavantaĝoj,

Emfazante la bezonon por rigora obeado de la rezolucioj kaj reguloj starigantaj lingvajn aranĝojn por la diversaj instancoj kaj organoj de la Unuiĝintaj Nacioj,

Rememorigante sian rezolucion 47/135 de 18-a de decembro 1992, en kiu ĝi alprenis la Deklaron pri la Rajtoj de Anoj de Naciaj aŭ Etnaj, Religiaj kaj Lingvaj Malplimulto, kaj la Internacian Interkonsenton pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj, precipe paragrafon 27-an en tiu, pri la rajtoj de homoj kiuj estas anoj de etnaj, religiaj aŭ lingvaj malplimulto,

Rememorigante ankaŭ siajn rezoluciojn 2 (I) de 1a de februaro 1946, 2480 B (XXIII) de 21-a de decembro 1968, 42/207 C de 11-a de decembro 1987, 50/11 de 2-a de novembro 1995, 52/23 de 25-a de novembro 1997, 54/64 de 6-a de decembro 1999, 56/262 de 15-a de februaro 2002, 59/309 de 22-a de junio 2005, 61/121 B de 14-a de decembro 2006 kaj 61/236 kaj 61/244 de 22-a de decembro 2006,

Konsiderinte la raporton de la Ĝenerala Sekretario kaj la leteron datitan je 26-a de februaro 2007 de la Ĝenerala Direktoro de la Kleriga, Scienca kaj Kultura Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj (UNESCO) pri la proklamo de jaro 2008 kiel Internacia Jaro de Lingvoj,

1 *Rimarkigas* la raporton de la Ĝenerala Sekretario kaj la leteron datitan je 26-a de februaro 2007 de la Ĝenerala Direktoro de la Kleriga, Scienca kaj Kultura Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj (UNESCO) pri la proklamo de jaro 2008 kiel Internacia Jaro de Lingvoj;

2 *Emfazas* la gravecon super ĉio de la egaleco de la ses oficialaj lingvoj de la Unuiĝintaj Nacioj;

3 *Substrekas* la bezonon por plena plenumo de la rezolucioj starigantaj lingvajn aranĝojn por la oficialaj lingvoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj la laborlingvoj de la Sekretariejo;

4 *Petas* al la Ĝenerala Sekretario, ke li certigu, ke ĉiuj lingvoservoj ricevu egalan traktadon kaj estu provizataj de egale favoraj laborkondiĉoj kaj rimedoj, cele al atingo de maksimuma egaleco de tiuj servoj, plene respektante la specifajojn de la ses oficialaj lingvoj kaj atentante iliajn taskoŝarĝojn;

5 *Ripetas* sian peton al la Ĝenerala Sekretario fini la taskon de ŝutado de ĉiuj gravaj pli malnovaj dokumentoj de Unuiĝintaj Nacioj al la TTTejo de Unuiĝintaj Nacioj en ĉiuj ses oficialaj lingvoj, prioritare, tial ke tiuj arkivoj estu alireblaj al Membro-Ŝtatoj ankaŭ per tiu medio;

6 *Ripetas*, ke ĉiuj enhavo-provizantaj oficoj en la Sekretariejo devos daŭrigi siajn klopodojn por traduki al ĉiuj oficialaj lingvoj ĉiujn anglalingvajn materialojn kaj datumbazojn afiŝitajn en la TTTejo de Unuiĝintaj Nacioj laŭ la plej praktika, efika kaj malmultekosta maniero;

7 *Petas*, ke la Ĝenerala Sekretario daŭre certigu, per provizado de dokumentaj servoj kaj kunvenoj kaj eldonaj servoj sub konferenca estrado, inkluzive altkvalitajn tradukadon kaj interpretadon, efikan plurlingvan komunikadon inter reprezentantoj de Membro-Ŝtatoj en interregistaraj organoj kaj anoj de spertulaj instancoj de Unuiĝintaj Nacioj egale en ĉiuj oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj;

8 *Emfazas* la gravecon provizi informojn pri Unuiĝintaj Nacioj, teĥnikan helpon kaj edukmaterialojn, kiam ajn eblas, en la lokaj lingvoj de la ricevantaj landoj;

9 *Rememorigas* sian rezolucion 61/236 de la 22-a de decembro 2006, en kiu ĝi reasertis la kondiĉojn rilate konferencoservojn de siaj rezolucioj pri plurlingvismo;

10 *Rememorigas* ankaŭ sian rezolucion 61/121 B de la 14-a de decembro 2006 kaj emfazas la gravecon de plurlingvismo en publikaj rilatoj kaj informagadoj de Unuiĝintaj Nacioj;

11 *Kontente rimarkas* la pretecon de la Sekretariejo kuraĝigi stabanojn en kunvenoj kun interpretoservoj, uzi iun ajn el la ses oficialaj lingvoj, kiun ili regas;

12 *Petas*, ke la Ĝenerala Sekretario nomu novan Kunordiganton por Plurlingvismo kaj rimarkigas la proponon en la raporto de la Ĝenerala Sekretario pri la informreto de fokusaj punktoj por subteni la Kunordiganton;

13 *Emfazas la gravecon de:*

(a) *Konvene uzadi* ĉiujn oficialajn lingvojn de Unuiĝintaj Nacioj en ĉiuj agadoj de la Instanco pri Publika Informado de la Sekretariejo, cele al forigo de la malegaleco inter uzado de la angla kaj uzado de la kvin ceteraj oficialaj lingvoj;

(b) *Certigi* la plenan kaj egalecan traktadon de ĉiuj oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj en ĉiuj agadoj de la Instanco de Publika Informado, kaj tiurilate reasertas sian peton al la Ĝenerala Sekretario certigi, ke la Instanco havas plenan stabon por ĉiuj oficialaj lingvoj de la Unuiĝintaj Nacioj por entrepreni ĉiujn ĝiajn agadojn.

14 *Reasertas* la bezonon por atingi plenan egalecon inter la ses oficialaj lingvoj ĉe la TTTejoj de Unuiĝintaj Nacioj, kaj tiurilate:

(a) *Instigas* la Ĝeneralan Sekretarion daŭrigi siajn klopodojn evoluigi plurlingvajn TTTejojn de Unuiĝintaj Nacioj;

(b) *Reasertas*, ke la TTTejo de Unuiĝintaj Nacioj estas esenca ilo por la informilaro, neregistaraj organizaĵoj, klerigaj institucioj, Membro-Ŝtatoj kaj la ĝenerala publiko, kaj redeklaras la daŭran bezonon por klopodoj fare de la Instanco pri Publika Informado konservi kaj plibonigi ĝin;

(c) *Reasertas* sian peton al la Ĝenerala Sekretario, ke tiu certigu, samtempe konservante aktualan kaj seneraran TTTejon, sufiĉan distribuon de financaj kaj homaj rimedoj interne de la Instanco pri Publika Informado asignitaj al la TTTejo de Unuiĝintaj Nacioj inter ĉiuj oficialaj lingvoj, kontinue atentante la specifecon de ĉiu lingvo;

(d) *Rimarkas*, ke la plurlingva evoluado kaj riĉiĝado de la TTTejo de Unuiĝintaj Nacioj pliboniĝis, kvankam malpli rapide ol oni atendis, pro atentindaj devigoj;

(e) *Petas* al la Instanco pri Publika Informado, kunorde kun enhavo-provizaj oficoj, plibonigi la agojn faratajn por atingi egalecon inter la ses oficialaj lingvoj ĉe la TTTejo de Unuiĝintaj Nacioj, precipe per plirapidigo de la plenigo de nun vakaj postenoj en kelkaj fakoj;

(f) *Rekonas*, ke kelkaj oficialaj lingvoj uzas nelatinajn kaj dudirektajn skribsistemojn, kaj ke la teĥnologiaj infrastrukturoj kaj subtenaj aplikoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj baziĝas je la latina skribsistemo, kio kreas malfacilaĵojn pri traktado de nelatinaj kaj dudirektaj skribsistemoj, kaj petas al la Instanco de Publika Informado, kunlabore kun la Fakoj pri Informteĥnologiaj Servoj de la Instanco de Estrado de la Sekretariejo, daŭrigi siajn klopodojn por certigi, ke teĥnologiaj infrastrukturoj kaj subtenaj aplikoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj plene subtenu latinajn, nelatinajn kaj dudirektajn skribsistemojn por plibonigi la egalecon de ĉiuj oficialaj lingvoj ĉe la TTT-ejo de Unuiĝintaj Nacioj;

15 *Bonvenigas* la kunlaborajn aranĝojn entreprenitajn de la Instanco de Publika Informado kun akademiaj institucioj por pliigi la nombron de TTT-paĝoj haveblaj en kelkaj oficialaj lingvoj, kaj petas al la Ĝenerala Sekretario esplori kromajn kostneŭtralajn metodojn por pluetendi tiujn kunlaborajn aranĝojn kunordige kun enhavo-provizantaj oficoj, por inkluzivi ĉiujn oficialajn lingvojn de Unuiĝintaj Nacioj, ĉiam memorante la bezonon por obeo de la normoj kaj gvidlinioj de Unuiĝintaj Nacioj;

16 *Kontente rimarkas* la oficialan lanĉon de iSeek en Ĝenevo en la du laborlingvoj de la Sekretariejo kaj instigas la Sekretariejon daŭrigi siajn klopodojn plenumi iSeek ĉe ĉiuj laborstacioj, ankaŭ por evoluigi kaj plenumi kostneŭtralajn rimedojn por provizi Membro-Ŝtatojn per sekura alirado al la informoj aktuale alireblaj nur pere de la Interna Reto de la Sekretariejo;

17 *Kun ŝato rimarkas* la laboron plenumatan de la informcentroj de Unuiĝintaj Nacioj, inkluzive la Regionan Informcentron de Unuiĝintaj Nacioj, favore la eldonadon de informmaterialoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj la tradukadon de gravaj dokumentoj en lingvojn aliajn ol la oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj, cele al atingo de la kiel eble plej vasta legantaro kaj etendo de la mesaĝo de Unuiĝintaj Nacioj al ĉiuj partoj de la mondo por fortikigi internacian subtenadon por la agadoj de la Organizaĵo; kaj instigas al informcentroj de Unuiĝintaj Nacioj daŭrigi siajn plurlingvajn agadojn en la interagaj kaj antaŭagaj aspektoj de sia laborado, aparte per aranĝado de seminarioj kaj debatoj por pludisvastigi informojn kaj komprenon kaj interŝanĝadon de opinioj pri agado de Unuiĝintaj Nacioj ĉe la loka nivelo;

18 *Rememorigas* sian rezolucion 61/244 de la 22-a de decembro 2006, en kiu ĝi reasertis la devon respekti la egalecon de la du laborlingvoj de la Sekretariejo, reasertis la uzadon de kromaj laborlingvoj en specifaj laborstacioj kiel devigaj, kaj tiurilate petis al la Ĝenerala Sekretario, ke tiu certigu, ke anoncoj pri vakaj postenoj specifigu la bezonon por iu ajn el la laborlingvoj de la Sekretariejo, se la funkcioj de la posteno ne postulas specifan laborlingvon;

19 *Ankaŭ rememorigas* paragrafon 17 de sekcio II de sia rezolucio 61/244, en kiu ĝi agnoskis, ke la interagado de Unuiĝintaj Nacioj kun la surloka loĝantaro estas esenca kaj ke lingvaj kapabloj estas grava elemento de la elekta kaj eduka procedo, kaj tial asertis, ke bona regado de la oficiala(j) lingvo(j) parolata(j) en la loĝlando estu atentata kiel kroma bonhavo dum tiuj procedoj;

20 *Emfazas*, ke dungado de stabanoj daŭre plenumiĝu strikte laŭ Artikolo 101 de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj laŭ la tiurilataj kondiĉoj de rezolucioj de la Ĝenerala Asembleo;

21 *Cetere emfazas*, ke la progresado de stabanoj en la Profesiaj kaj pli altaj kategorioj estu plenumataj strikte laŭ Artikolo 101 de la Ĉarto kaj laŭ la kondiĉoj de rezolucioj 2480 B (XXIII) de la 21-a de decembro 1968 kaj la tiurilataj kondiĉoj de rezolucio 55/258 de la 14-a de junio 2001;

22 *Instigas* al stabanoj de Unuiĝintaj Nacioj daŭre aktive uzi ekzistantajn edukajn rimedojn por akiri kaj plibonigi siajn kapablojn pri unu aŭ pli el la oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj;

23 *Rememorigas*, ke lingva diverseco estas grava elemento de kultura diverseco kaj rimarkigas la devigo-komencon je 18-a de marto 2007 de la Interkonsento pri Protektado kaj Akcelado de la Diverseco de Kulturaj Esprimoj;

24 *Bonvenigas* la decidon faritan de la Ĝenerala Konferenco de la Kleriga, Scienca kaj Kultura Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj (Unesko) je 17-a de novembro 1999, ke 21a de februaro estu proklamita Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, kaj alvokas al Membro-Ŝtatoj kaj la Sekretariejo akceli la konservadon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj uzataj de la mondaj popoloj;

25 *Proklamas* 2008, **Internacia Jaro de Lingvoj**, laŭ la rezolucio alprenita de la Ĝenerala Konferenco de la Kleriga, Scienca kaj Kultura Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj (Unesko) ĉe ĝia tridek-tria sesio je 20-a de oktobro 2005, invitas la Klerigan, Sciencan kaj Kulturen Organizaĵon de Unuiĝintaj Nacioj (Unesko) servi kiel estra instanco por la Jaro, kaj en tiu kunteksto:

(a) *Invitas* Membro-Ŝtatojn, la sistemon de Unuiĝintaj Nacioj, kaj ĉiujn aliajn tiurilatajn koncernatojn evoluigi, subteni kaj intensigi agadojn kiuj celas krei respekton por kaj akceladon kaj protekton de ĉiuj lingvoj (aparte minacataj lingvoj), lingva diverseco kaj plurlingvismo;

(b) *Invitas* la Ĝeneralan Direktoron de la Kleriga, Scienca kaj Kultura Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj (Unesko) raporti al la Ĝenerala Asembleo ĉe ties sesdek-tria sesio pri la efiko de la agadoj plenumitaj dum la Internacia Jaro de Lingvoj;

26 *Reasertas* sian rezolucion 61/185 de 20-a de decembro 2006 rilate la proklamon de internaciaj jaroj, en kiu ĝi emfazis la bezonon atenti kaj apliki la kriteriojn kaj procedojn entenatajn en la aldoniĝo al rezolucio 1980/67 de la Ekonomia kaj Socia Konsilio pri internaciaj jaroj kaj datrevenoj, de 25-a de Julio 1980 por konsideri estontajn proponojn por internaciaj jaroj;

27 *Petas*, ke la Ĝenerala Sekretario antaŭmetu al la Ĝenerala Asembleo ĉe ties sesdek-tria sesio plenan raporton pri la plena plenumo de ties rezolucioj pri plurlingvismo;

28 *Decidas* inkluzivi en la provizoran tagordon de sia sesdek-tria sesio la eron titolitan "Plurlingvismo".

(Kursivigoj kaj grasigo de la redaktoro)

7 18-a konferenco de GIL en Berlino

Kiel konate la germana scienca organizaĵo „Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL, societo pri interlingvistiko), ĉiujare okazigas siajn fakajn konferencojn, en kiuj oni prezentas inter 10-12 fakprelegojn, kiuj estas publikigataj en la aktoj de la konferenco (Beihefte). Jam aperis 14 volumoj.

La 18-a konferenco de GIL okazos de la 21-a ĝis 23-a de novembro 2008 en Berlino.

La lingvo de la konferenco estas, kiel kutime, la germana.

La kadra temo ligiĝas al la Jaro de la Lingvoj:

„Esperanto kaj aliaj lingvoj en komparo“

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvo-Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org . ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 633, fakso:+ 49-30-54 56 742, dblanke.gil@snafu.de. Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retroŝto aŭ sur disketo/KD. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Estas bibliografiataj ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro. Kunlaborantaj el ĉiuj regionoj de la mondo bonvenas.
